Kaj eble reveni? Neniu ja scios. Eble la maljunulo tamen estis prava? Tiu nubeto pligrandiĝas kaj ŝajnas esti pli proksima. Li ja legadis pri teruraj valaj ventegoj, kiuj arbojn elradikigas el la tero!

Tie malsupre, tre malproksime, svarmas io blanka. La ŝafaro de la paŝtisto rapidas al sendanĝera rifuĝejo.

Ho jes. Estas necese reveni. Li nur devas turniĝi kaj reiri la saman vojon. Sed tio estas nun pli malfacila. Li ne povas rapidi, li devas paŝi singarde, tre singarde, ĉar la ŝtonoj, tuŝitaj jam antaŭe de liaj piedoj, nun fariĝis ŝutemaj, kiel sablo, kaj ĉiumomente minacas forglitiĝi malsupren.

Kaj la vento potenciĝas. Ĝi ekblovis — kaj la rokoj staras senpolvigataj, blankaj, kiel ostoj de kadavro. Ĝi ondigas la malproksiman arbaron, fajfas ĉe la montpintoj.

La junulo, kovrita per ŝvito, rapidas reen. Tien, kien rifuĝis la ŝafaro, kie uragano ne estas danĝera. Sed kia vojo! Jam ne nur sablo kaj ŝtonoj, sed grandaj rokpecoj ruliĝas malsupren kaj logas lin en abismon. Vere, ne tie estis la vojo.

Polvo turniĝis ĉirkaŭ li kaj surŝutis liajn okulojn, penetris en la buŝon. La ventego jam estas tie ĉi, jam ĝi tondras ĉirkaŭe kaj puŝas, puŝas senkompate. Se li almenaŭ havus firman fundamenton sub la piedoj, li povus platiĝi al la roko kaj eble super lia kapo pasus la uragano. Sed tiuj perfidaj ŝtonoj tremas kaj balancas sin. Jen tie la rokpeco ŝajnas fiksita pli forte. Plue post ĝi la irejo estas jam pli larĝa. Salt!!

...sablo, ŝtonoj, rokoj, ĉio en subita eksvingo ekfulmis supren. El malsupre elsaltis kaj suprenflugis ventrapide malmola, senkompata fundo de abismo.

Tagon poste malgranda savantaro ekiris en la montojn. La maljuna ŝafisto montris al ili la direkton. Nelonge daŭris la serĉado. Ili trovis la kadavron masakritan sur akraj ŝtonoj, kun peza rokpeco sur la brusto...

Ne tie estis la vojo!

Tatroj, kara montaro! Via sino kaŝas misterojn, sur viaj vojoj ofte paŝas danĝero. Al tiuj, kiuj vin konas, vi malkaŝas sorĉajn bildojn, sed por la facilanimaj kuraĝuloj, kiuj sen necesa sperto malŝatas la montritajn vojojn — por tiuj vi havas — pereon.

La maljuna ŝafisto jam mortis delonge. Ventoj ploras super lia tombo, aĝloj ĝrakas... La ŝafoj diskuris tra la montaro.

Vi, Tatroj, staras ĉiam, kiel vi staris: imponaj, majestaj. Al vi duboj ne estas teruraj, ventego ne fleksas viajn pintojn. Nur la nematuraj turistoj, kies proprakulpa pereco supozigas pri nefirmeco de via rokaro kaj fortimigas aliajn, nur ili kaŭzas, ke tiel multaj timas iri en la montaron. Ilin, ilin kulpigu, ke via famo ne tiel ankoraŭ disportigis tra la mondo, ke vi estas evitataj de multaj ankoraŭ, nefidataj de multaj. Tamen, ho Tatroj, kion oni povas kompari kun via beleco, kun la potenca konstruo de viaj fundamentoj?

Ĉiujare novaj homoj venas al la piedoj de la montoj. Ĉe la vojdiŝigo ne avertas plu la bonkora paŝtisto. La montoj ravas kaj logas. La rokoj ŝajnas tiel fortaj. Sed eĉ ŝajne firma roko ektremas sub la piedoj de nespertulo. Unu falinta rokpeco posttiras la aliajn, la potenca ŝtona muro ŝajnas ŝanceli sin kaj jen pro unu nesingarda paŝo la turista ĝajnas honton aŭ pereon.

Karaj turistoj! Se vi ne volas mizere pereji, ne serĉu vojon tie, kie ili ne estas. La altaĵoj vere kaŝas en si mirindan belon, sed ne risku facilanime danĝeron ĉe la rokaj abruptaĵoj, kaj al sovaĝaj pintoj, kie fajfas uraganoj, ne iru sen gvidisto!

Lidja Zamenhof.

GRAVA SCIIGO.

Interŝtata kaj internacia lerneja intersanĝado.

Ĉi sube ni tradukas kelkajn punktojn de regularo pri la Interŝtata kaj Internacia Lerneja Intersanĝado, ĵus kreita en nia lando, kiel parto de la dekreto reforminta la Publikan Instruado-Departementon de nia ĉefurbo. Tiu fakto estas tre interesa al ni, esperantistoj, ĉar Esperanto vere kontribuas, praktike kaj plej konvene, al la interkompreniĝado de lernejoj malsamnaciaj. Jen kelkaj paraĝrafoj:

„La intersanĝado estos farata per la intersendado de naciaj dokumentoj pri la vivo de ĉiu popolo, folkloraj legendoj, foto-albumoj, gravuraĵoj, marŝarioj, karakterizaj muzikaĵoj, historiaj dokumentoj, filmoj, diapozitivoj, moneroj kaj poŝtmarkoj, kaj unuvorte ĉio, kio povos prezenti la nacian individuecon kaj plifirmigi la idealon de la homa solidareco”.

„Estos ankaŭ sendataj kaj akceptataj ĉiaj manlaboraĵoj: memkreitaj desegnaĵoj, rakontoj, priskribaĵoj, leteroj, revuoj de la anoj de la lernejoj unuagrada, metiaj kaj normalaj, kaj same produktaj de diversaj laborejoj de la metiaj lernejoj, montrantaj lertecon, guston kaj aktivecon de iliaj anoj”.

„Estos unu el ĝiaj celoj la intersanĝado, kun fremdaj landoj, de beletristikaj produktaĵoj kaj didaktikaj verkoj de la plej bonaj naciaj verkistoj”.

„La intersanĝado devas okazi ĉiam inter anoj de samspecaj lernejoj”.

„Estos organizataj, en la lernejoj, sub la patroneco de alilandaj nomoj, malgrandaj ambasadorejoj, kun la tasko fari la servon de la internacia intersanĝado kaj krei la historian muzeon de la lernejo”.

La kursoj de Esperanto por infanoj profitu tiun okazon; tio havigos al ili duoblan rezultaton, ĉar ili trovos korespondantojn kaj forte helpos nian movadon. Junaj samideanoj, turnu vin al nia sidejo, por pli detalaj informoj. Samideanoj tutmondaj, gratulu nian Instruo-Departamenton pro la starigo de tiel grava servo.

Brazila Ligo Esperantista skribis al S-ro Direktoro de la Departemento de Publika Instruado, proponante sian helpon por la tradukado de la korespondadoj sendotaj kaj ricevataj en Esperanto. Tiu propono estas akceptita de la Direktoro, per letero skribita de la Teknika Direktoro de la Departemento.

Ni petas, ke ĉiu samideano ricevinta tiun ĉi sciigon, bonvolu ĝin diskonigi en sia loko, informante samtempe, ke ĉiu korespondado estu adresita al:

Secretario Geral do Correio Escolar
 Prefeitura — Praça da República
 Rio de Janeiro — BRASIL.

KOMUNIKOJ DE P. E. D.

Estas decidite, ke la Internacia Kongreso 1931, post la Oksforda 1930, okazos en Kraków. Preparaj laboroj jam estas komencitaj de la Prezidanto de la Urbo kun ĉiama kunlaborado de P. E. D. Unu el plej gravaj taskoj estas jam nun komenci kolekton de garantia fondo por laboroj de la venonta Kongreso. Estos kunvokita en mallonga tempo plena Organiza komitato por pripensi kaj priklopodi necesajn aranĝojn, kiuj devas esti farotaj ne nur en Kraków, sed ankaŭ en aliaj urboj vizitotaj dum la Kongreso. Estos necesaj multaj ekskursoj en plej interesajn urbojn de nia lando, por montri nian industrian disvolviĝon, niajn minejojn, fabrikojn, banlokojn k. t. p. Do bonvolu, samideanoj, disponigi al ni diversajn proponojn ligitajn kun la venonta Kongreso kaj samtempe ne forgesu, ke ĉiuj projektoj estas ligitaj kun bezono de mono. Estas necese elekti en ĉiu societo aŭ asocio aŭ grupo ekonomian komisionon, kies tasko estu kolekti garantian kapitalon por la kongresa kaso, kiu ne povas baziĝi nure sur la oficialaj fondoj. Ni devas montri al la alvenontaj gastoj kiel eble plej grandan gastemecon, ĉar ne forgesu ke ni estas lando de lulilo de Esperanto; niaj devoj kontraŭ ĉiuj aliaj estas tiom pli grandaj. Do jam nun kolektu eĉ malgrandajn sumojn kaj konservu listojn kun subskriboj por montri al la Esperanto-Mondo ke ni grandare sentas kaj pensas same. Unuagrade tiuj kolektoj servos por plifaciligi ĉeeston dum la Kongreso kaj subtenon de partopreno ĉe la Kongreso al la blinduloj kaj militaj kripluloj, kiuj plej multe meritas tiun helpon, duaĝrade por diversaj eldonaĵoj (tradukoj kaj originalaj verkaĵoj), ĉar estas necese ke nia lando montru vivon kaj forton.

Kiuj preferas monate pagi malgrandan sumeton, povos sendi po 1 zł. monate al la ĉekkonto No 406.660, Kraków, Pola Esperantisto kun surskribo: **garantia fondo 1931.**

La Estraro de PED petas ĉiujn Esperanto-grupojn kaj societojn en Polujo elsendi al: Rada Miejska m. st. Warszawy — Warszawa leterojn kun varma peto pri alinomigo de strato „Dzika” je „Zamenhofa”. Ju pli multaj alvenos leteroj des pli certa estos efektiviĝo de la peto. Kolektu kiom eble plej multajn subskribojn!

La presitan en la oktobra n-ro de PE. 1929 formularon de „Statistiko pri la grupoj” respondis ĝis nun nur malmultaj asocioj. S-oj sekretarioj bonvolu tion tuj fari kaj ne malfaciligi nian laboron!

Akademia Esperanto Rondo en Wilno intencas aranĝi dum Pentekosto ekskurson al Riga, kie tiam okazos Balta Esp.-Kongreso. La ekskurso daŭros 3 tagojn, kostoj 65—75 zł. (de Wilno) kun event. komuna loĝejo kaj favoraj pasportoj. La interesigantoj bonvolu tiuafere interrilati kun s-o R. Sakowicz, prokuro, Wilno, Krzywa 23.

Respondo. S-ro D-ro Mędrkiewicz, Łódź. Kelkaj el viaj proponoj efektiviĝos en mallonga tempo dum preparaj laboroj por venonta Kongreso.

POLLANDA KRONIKO.

BIALYSTOK. La 28-3. okazis prezentado de nova esp. revu-teatraĵo „LA VERDA MUELEJO”, teksto de F. K. muz. de K. Szapiro, organizita de Zamenhofa Esp. S-to. Partoprenis anoj de artista rondo ĉe la S-to: f-inoj T. Borowicz, S. Mekler, G. Miller, D. Peltinowicz kaj R. Porozowska; s-roj S. Apfelbaum, B. Halpern, M. Dargużański, A. Łapinicki, S. Osowicki kaj B. Śacman. Reĝisoris s-roj Osowicki kaj Tynowicki. Multe aplaŭditaj estis solkantoj de eta knabino S. Mekler (fratino de nia fervora societano Benjo). Post la prezentado, okazinta en teatra salono kaj bone vizitita, la geesperantistoj vigle dancis ĝis mateno. Menciindaj estu la originalaj kaj belaj dekoracioj scenejaj, faritaj de nia samideano W. Popow, i. a. elektre lumigita kaj movata muelejo. — Sekve de interveno de la prez. de Zam. Esp. S-to, s-ro J. Szapiro, la loka vojevoda komitato, kolektanta materialon por la okazonta en julio en Poznań Internacia Ekspozicio de Komunikado kaj Turismo decidis en la fako de Białystoka Vojevodejo disponigi specialan lokon al eksponaĵoj, montrantaj la utilecon de Esperanto por turisma propagando.

Fianĉiĝo: S-ro Koniak Isocher membro de Zam. Esp. S-to en Białystok fianĉiĝis kun f-ino Luba Reznik. Koran gratulon!

Dąbrowa'a Minejteritorio. La movado disvolviĝas sufiĉe rapide kaj, kio estas pli grava, sistemece. En marto 6 grupoj, apartenantaj al Esp.-Delegitaro de Zagłębie (Z. — minejteritorio), laŭ ĝiaj direktivoj prilaboris jarajn labor- kaj propagandplanojn de Esperanto. La 29. III. okazis publika ekzameno por finintoj de trimonataj kursoj gvidataj de EDZ. Simila ekzam. okazis la saman tagon en Będzin. La 2. II. EDZ. organizis ekzam. por kursanoj en Wysoka apud Łazy. La 6-an de III. okazis la ekzam. por instruistoj de popollernejoj, kiuj finis 32-horan kurson de Esp. La komisiono konsistis el s-oj: prof. Bujwid, droj H. Broder kaj A. Ingster kaj B. Czechowski — la kursgvidinto. El inter la kandidatoj estas honore distingita s-ino W. Kołodziejska. (Ŝia adr.: Sosnowiec, str. Ludwika 12). Ekspozicio por korespondaĵoj de la kursanoj enhavis tre interesan leteron senditan el Polujo kaj ricevitan kun bondeziroj de instruistoj el Hispanujo, Svedujo kaj Germanujo. La 6. III. okazis prelego de prof. Bujwid en la salono de teatro plenigita de publiko el Silezio kaj Zagłębie. Esp.-grupo ĉe TUR en Sosnowiec decidis pli-interesigi ekspozicion de bildoj, aranĝitan profite al ekskurso Svedujon kaj Danujon, per reprodukcioj de pentraĵoj el diversaj landoj, senditaj de esperantistoj. Anoj de la grupo ricevas florsemojn el diversaj landoj kaj kulturas ilin en ĝardenoj por poste ornami salonon de la kongreseto aranĝota en junio por distriktaj esp.-aferoj. Por aŭgusto prepariĝas helpe de esperanto ekspozicio de ilustrita tutmonda gazetaro. Dum la somero okazos ĉ. 30 ekskursoj, aranĝotaj de la grupoj por konversacii kaj propagandi Esperanton.

KRAKÓW. La 31-an de marto okazis jarkunveno de Esp. Societo, kiu elektis novan estraron. La estraron eniris: s-o prof. Bujwid — prezid., s-ino Neuberger — vicprez., s-o Janczałek — sekr., s-o Kutscher — kasisto, f-ino Bertig — bibliot., s-ino Dr. Rosenthal — vicsekr., s-ino Srebrna — mastrino, Dr. Dreher kaj Hodakowski — estraranoj. Al la Revizia Komisiono apartenas: f-ino Weinsberger, s-oj prof. Kowalski kaj Rudnicki. — Estas gvidata nova kurso en 5-a klaso de gimnazio de Sta Jacek. Prepariĝas du pluaj, unu supera kaj unu komenca. Gvidanto: s-ano Hodakowski. — La 9-an de k. m. forveturis al Holando, invitite de tieaj samideanoj, s-o prof. Bujwid por prelegi en ok diversaj urboj pri Polujo (kompreneble en Esperanto). Dumvoje li prelegis antaŭ la mikrofono de Radiostacio en Katowice en franca kaj esperanta lingvoj por la „familio de Katowicianoj”, kiu estas grandega, havante anojn eĉ en norda Afriko. S-ro Dro Tymieniecki proponis al prof. B. partoprenadi regule en la Radio-kesto. Samideanoj el ĉiuj landoj bonvolu skribi al Katowica radiostacio kaj vi ricevos per tiu ĉi radio-kesto respondojn. Skribu ofte kaj rekte al Radio Katowice. — De tempo al tempo okazos prelegoj esperantlingve, laŭ la publikigota programo.

LWÓW. La 6. II. okazis tie ĉi jara kunveno de UEA-anoj. Post la vigla raporto, kiu ĉiujn tre kontentigis, ĉar alvenis multaj novaj anoj, estas denove unanime elektita s-o dro Fels, kiel delegito kaj s-o Kucharz vic-del. La 13. III. okazis prelego de f-ino L. Fruchtówna „Pri esperanta originala poezio”. Ĝi estis tre interesa kaj ricevis grandan aplaŭdon. Nune okazas du kursoj: komenca kaj supera. Iliaj gvidantoj estas f-inoj Nadel kaj Fruchtówna.

NOWOGRÓDEK. Loka Societo de Popollernejaj Instruistoj aranĝis Esp-kurson, kiun vizitas dudeko da instruistoj kaj privatuloj. La kurson gvidas inĝ. Michał Chmieliński. Dua grupo en preparo.

ŚWIECIE NAD WISŁĄ. Estas malfermita Esp.-kurso ĉe profesia ligo de popollernejaj instruistoj. 15 partoprenantoj. Gvidanto: s-o J. Żołnierz.

WARSZAWA. Akademia Esperantista Rondo ĉe J. A. H. (Nowy Świat 21) laŭ la propono de s-o Dratwer entreprenis vastan agadon por alinomigo de strato „Dzika“ je „Zamenhofa“. Tiucele estas presitaj kelkaj miloj da specialaj folioj enhavantaj koncernen peton al la Urbestro kaj lokon por 50 subskriboj. Aliaj esperantaj societoj partoprenas la agadon. Detaloj sekvos kaj rezultoj estos konigitaj.

La 28-an de febr. okazis ĝenerala kunveno de Pola Esperanto-Asocio, kiu prezentinte agadon de la grupo dum la pasinta jaro kaj honorinte mortintajn samideanojn, la karmemorajn: Jan Pudel, dron Stefan Mikołajski, dron Szymon Karlsbad, L. Kronenberg, prof-ojn Baudouin de Courtenay kaj Benedykt Dybowski, elektis novan estraron, kiun eniris s-oj kaj s-inoj: prof. Odo Bujwid — prez., Ant. Stankiewicz kaj Ant. Czubyński — vicprez., Eugenia Cense kaj Roman Grzybowski — sekret., J. Burkathówna kaj W. Grzybowski — kasist., R. Ignaciuk — bibl., krom tiuj anstataŭantoj: M. Trochimowski, A. Zalewska, K. Sowińska, A. Dowgierdówna, H. Mieszkisówna.

En februaro k. j. okazis jarkunveno de Pola Studenta Esperantista Societo. La raportoj de la Estraro kaj de la Eldona Sekcio estis unuanime akceptitaj. La Revizia Komisiono dankis al eksiganta Estraro por la agado kaj esprimis speciale koran dankon al f-ino Weinsteinówna, gvidantino de la Eldona Sekcio, por intensa kaj fruktodona laboro en la nomita Sekcio. — La nova Estraro elektita dum la jarkunveno estas jena: Prezidanto — S-ro Mieczysław Trochimowski, Vicprezidanto — S-ro Aleksander Nietupski, Ĝen. Sekretariino — F-ino Halina Weinsteinówna, Sekretario — S-ro Edward Kotlicki, Kasistino — F-ino Marja Maliszewska. — La 20. I. 1930 oni komencis la kurson por komencantoj. Gvidas ĝin f-ino Weinsteinówna laŭ senpera metodo. — La 8. III. 1930 oni aranĝis prelegon en vira gimnazio. Parolis S-ro Trochimowski: „Esperanto-unika, facila lingvo internacia“. — La 8. V. 1930 P. S. E. S. kune kun la Studenta Unuiĝo ĉe Ligo de Nacioj organizas prelegon de prof. Jerzy Loth en Varsovia Universitato pri Esperanto.



UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Śapiro, Lipowa 33, Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO No 16.

JARLIBRO 1930. Ĝoje ni anoncas, ke la nova Jarlibro por 1930 estas nun jam en presado. Ĝi estos finpresita dum la nuna monato kaj en majo komenciĝos ĝia ekspedado al la membroj. Nunjare ĝi do aperos pli frue ol kutime, kio certe kontentigos nian membraron. La unua parto de la Jarlibro enhavas esperantistan enciklopedion, aron da variaj informoj el la esperantista vivo kaj mondo. La dua (adresa) parto montras ĝojigan kreskon de lokoj, kie UEA havas Delegitojn. Ankaŭ la eksterajo estos pli riĉa, pli plaĉa. La Centra Oficejo ĉefe zorgis pri pli solida kartonkovrilo. Kompreneble la Jarlibron ricevos nur la membroj, pagintaj sian kotizon por 1930.

NEREPAGINTOJ. Pro baldaŭa dissendo de la Jarlibro ni tre insiste petas la membrojn, kiuj ĝis nun ne repagis sian kotizon por 1930, ke ili faru tion kiel eble plej baldaŭ. Membroj, kiuj pro iu-ajn kaŭzo ne povas realiĝi aŭ kiuj dezirus prokraston de pago, bonvolu nin informi pri tio. Al ĉiuj membroj, kiuj ne repagis sian kotizon kaj ne sendis al ni informon, ni dissendos la Jarlibron per poŝtrepago, alkalkulante la kaŭzitan pro tio koston. Evitu do senutilan plielspezon, repagante tuj la kotizon al via loka Delegito aŭ al la Ĉefdelegito.

LIBROSERVO. Ni informas, ke la laste aperinta gravega verko de P. E. Stojan „Bibliografia de Internacia Lingvo“, ampleksanta 560 grandformatajn paĝojn, estas mendebla ĉe la Ĉefdelegito. La prezo de la libro estas sv. fr. 12,50 aŭ Zl. 21,50. Membroj de UEA ne pagas por la afranko. La monon bonvolu pagi je poŝtĉekkonto No 60.047. Oni povas pagi ankaŭ al la loka Delegito.

REKLAMA SERVO. Laŭ peto de banloka direkcio en Bad Warmbrunn ni dissendis al la Delegitoj por disdono inter nia membraro la ĵus aperintan Esperantan prospekton pri tiu banloko. Membroj, interesigantaj pri tiu prospekto, bonvolu postuli ĝin ĉe la loka Delegito.

STATO DE UEA EN POLUJO. Ni notas kun plezuro pluan kreskon de nia membraro. La 1-an de Aprilo n. j. UEA kalkulis en Polujo 307 membrojn (3 DM, 7 MS, 202 MA, 95 M) kaj 1 Esp. Entreprenon.

NOVAJ DELEGITOJ. Ankaŭ nia Delegitaro pligrandiĝis. Jen estas la novaj Delegitoj:

BĘDZIN. D. A. M. Rozen, komercisto, Potockiego 1.

VD. Jakobo Freiberger, oficisto, Browarna 3.

BRZEŚĆ n. B. D. Rajnoldo Vonago, juĝisto, Białostocka 35.

VD. Michał Demidowicz, pensiulo, Sienkiewicza No 10.

LIDA. D. Andrzej Gołachowski, arbara inĝeniero, Nadleśnictwo.

PROSZKOWICA. D. Jakobo Rozenblum, instruisto.

WŁOCŁAWEK. D. Adam Szczygłowski, farmaciisto, plac gen. Dąbrowskiego 1/12.

En Lwów okazis la 27. 2. n. j. dum kunveno de UEA-anoj laŭstatuta elekto de Delegito. Ni petas tial noti la jenan ŝanĝon:

LWÓW. D. Izydor Fels, kuracisto, Słoneczna 1.

VD. Józef Kucharz, fervojisto, Na Błonie 54a.

Białystok, la 1. 4. 1930.

J. Szapiro, Ĉefdelegito de UEA.

TRADUKA KONKURSO.

SOLVO DE L' TRADUKA KONKURSO

el numero februara 1930 P. E.

Solvojn de l' traduka konkurso alsendis ĝesamideanoj: **A.** Anonimo 71; **B.** inĝ. M. Chmieliński; **C.** „Lena“; **D.** dir. J. Orzech; **E.** C. Pawlik; **F.** B. Pruc. Ĉar ne estis eble prijuĝi ĉiun tradukon kiel tuton, ni estas devigitaj taksi ĉiun frazon aparte. Jen la solvoj:

a. Tro maldika papero videbligas la skribajon sur la alia paĝo 1) (solvis **A.**) — **b.** Tute ne gravas por mi, kion dirados pri mi tiuspecaj homoj (s. **F.**) — **c.** Aspekto 2) de tilio estas tute alia ol aspekto de poplo (**E.**) — **d.** Mi estas scivola, ĉu efektive tiu libro estas tiel interese (A) 3). — **e.** Mi konsterniĝis 4), aŭdinte ĉi tiun sciigon; miaj kapharoj starleviĝis 5) kaj mi ne povis eĉ simplan vorton elbuŝigi (**F.**) — **f.** La vojo estis malfacila 6), la sovaĝemaj ĉevaloj oftamente stariĝis 7) sur postpiedo 7) ĉiam spionorelumante (**D.**) — **g.** Kaj mia nigrulo alnukigis siajn orelojn kaj ventege kurrapidegis antaŭ sin (**B.**) — **h.** Ni ekveturis 8) galope (**B.**) — **i.** Ho, kia glitiga vojo estos, kiam ekfrostos. (**C.**)! — **j.** Mi interesiĝas pri rezultoj de piedpilkaj vetludoj 9) (**B.**) — **k.** Por interesi la publikon, oni aplikis ĉiufoje novajn konceptojn (**A.**) — **l.** Ho, jen sagaculo (**A.**)! — **m.** Malsatiĝinte, ni appetite forglutegis 10) abundan vespermanĝon (**B.**) — **n.** Li obstiniĝis kaj ne lasis venkantaŭi sin 11) (**F.**) — **o.** Por kio taŭgas al vi piedbato 12) kontraŭ la destino (**E.**) — **p.** Neniu korekte tradukis 13). — **r.** Li ektroviĝis en situacio sen eliro (**C.**) — **s.** Eĉ per sia sagaco oni nenion 14) sukcesos 15) (**B.**) — **t.** Tempopasiga laboro ne donas bonajn rezultojn (**B.**)

Ĉar **B.**, t. e. s-o inĝ. Chmieliński, tradukis modele plej multe da frazoj (6) li gajnas la premion.

NOTOJ: 1) Laŭ **D.** „traen“, kiun ni opiniis tro pedanta. — 2) Pli bona estus: „silueto“. — 3) Preskaŭ same tekstas tradukoj de **B.**, **C.**, **F.** — 4) Ankaŭ: „rigidiĝis“ (laŭ **B.**, **C.**, **E.**) — 5) Same bona estas: „hirtiĝis“ (laŭ **A.**, **B.**, **C.**, **E.**) — 6) Ankaŭ „laciga“ laŭ **C.** — 7) Neakceptebla estis: „furiozstariĝadis“. — 8) Ne „ekrajdis“, ĉar ne nur temas pri sidado sur ĉevalo. — 9) Ankaŭ: „konkursludoj“ (laŭ **D.**) — 10) Ankaŭ bona: „englutegis“ (laŭ **A.**) — 11) La frazo pli korekte tekstus: Li obstiniĝis kaj ne lasis sin superi. — 12) Anstataŭ „piedbato“ pli komprenebla estas eble: kontraŭstari (la destino). — 13) Tial, ke „strzelać baki“ ne estas simple: erari, nek: fari erarojn. La frazo 16 aperos refoje en la sekvanta konkurso! — 14) Ankaŭ: neniom. — 15) Ankaŭ: atingos (laŭ **A.**, **C.**)

BIBLIOGRAFIO.

(verkis: Theta).

Dro L. L. Zamenhof: Esperanto-Paroladoj faritaj ĉe la malfermo de universalaj kongresoj de Esperanto 1905—1912. Kun enkonduko pri programo kaj deveno de l' Esperantimo, akompananta germana traduko kaj rimarkoj. Eldonis dro Emil Pfeffer, gazetara gvidanto de Aŭstria Esperanto-Delegitaro. Tagblatt-Biblioteko, Steyrermühl-Eldonejo. Vieno I, Wollzeile 20.

Plej bone bezonon de la libro prezentis la aŭtoro mem, skribante tre ĝuste en antaŭparolo, ke „por ĉiu deziranta pli detale konatiĝi kun Esperanto kaj Esperantismo... la paroladoj de... dro Zamenhof, estas fonto de unua kvalito. Jam laŭ pure lingva vidpunkto ili vekas nian admiron“. Bone faris la eldoninto havigante al ni la libron, kies Esperanto-parton kun granda interesiĝo legos ĉiuj mondlingvanoj.

Friedr. Gerstäcker: **La ŝipĉarpentisto**. Rakonto el la marista vivo. El germana lingvo tradukis Egruho. Eldonis: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo. Paĝoj 60. La libro apartenas al II-a serio de Ilustrita Biblioteko, n-oj 6/7.

Ĝi estas interesa rakonto pri maristo, kiu forkurinte de la ŝipo ekloĝis sur Tubuai-insulo, tie edziĝis kaj volis konduki trankvilan vivon, sed estis malhelpata de malbonaj homoj. Liaj aventuroj estas prezentitaj per flua lingvaĵo, en kiu cetero mi trovis multajn neologismojn, apartenantajn plej parte al la marista teknika vortaro. Ili estus por mi tute ne kompreneblaj... se ne aparta paĝo, sur kiu mi trovis sufiĉajn klarigojn.

Gorch Fock: **El „Navigado estas necesa“ kaj aliaj rakontoj**. II-a serio n-ro 8 de Ilustrita Biblioteko. Eldonejo kiel supre. Paĝoj 32.

Simile kiel la ĵus menciita libro parolas ankaŭ tiu ĉi pri la marista vivo. La unua rakonto estas tradukita el la germana lingvo (la titola). Post ĝi sekvas originala rakonto en Esp., verkita de Douglas P. Boatman, kaj fine la lasta „Agonio de la „Semillante“ de A. Daudet, kiun tradukis laŭ la franca originalo d-ro A. Fišer. — Oni aldonis klarigojn de nove-uzitaj esprimoj.

Oni alsendis al la Redakcio:

Paul Fructier: **Kompleta gramatiko kaj vortfarado de Esperanto**, reviziita kaj kompletigita de S. Grenkamp-Kornfeld. Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jasło, Pollando.

Bibliografio de Internacia Lingvo. Ellaboris kaj komentaris P. E. Stojan. 1929. Bibliografia servo de Universala Esperanto-Asocio. Paĝoj: 560.

Belga Antologio. Flandra Parto. Kompilita kaj kun literatura resumo de H. Vermuyten. Eldonita okaze de la 20-a Universala Kongreso de Esperanto. Belga Esp-Instituto (Koopera Societo), 11 Kl. Hondstr. Antverpeno. 1928. Paĝoj: 286.

Belga Antologio. Franca Parto. Kompilita kaj kun literatura resumo de M. Jaumotte. Eldonita okaze de la 20-a Universala Kongreso de Esperanto. Belga Esperanto-Instituto, 11, Kl. Hondstr. Antverpeno. 1928. Paĝoj 286.

Recenzo de l' cititaj kaj aliaj ricevitaj libroj aperos sinsekve en P. E.

RICEVITAJ GAZETOJ.

Krom la gazetoj cititaj en la februara kaj marta numeroj de P. E. ni ricevis ankoraŭ la jenajn:

Esperanta Grupo — Barcelona Stelo: informa bulteno.

Esperanto-lingva resumfolio de La Vojo de Klerigo, monata pedagogia revuo, Ĥarkov, USSR.

U. S. E.—EHO, trimonata revuo kies gviddevizo estas: Esperantistoj! **Realigu U. S. E.** (Unuigintaj Ŝtatoj de Eŭropo), en kiu Esperanto estu la ĝenerala helpa lingvo! Eldonejo: „Libro“, Timisoara 1, Str. Lonovici 1 (Rumanio-Banato).

Monda Kuriero — ilustrita semajna organo por komerco, trafiko, industrio kaj ĉiuj aliaj branĉoj de monda ekonomio. Abono duonjare: 2.50 sv. fr. Adreso: Administracio de Monda Kuriero, Sarajevo, Poŝtfako 131 (Jugoslavio).

Antaŭen — Ofic. gazeto de Hungaria Esp-ista Soc. Laborista, Budapest.

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio, Paris.

Brazila Esperantisto, ofic. org. de Brazila ligo Esp-ista Rio de Janeiro, Brazilo.

Arbeiter Esperantist, ofic. org. de laborista Esp.-Asoc. por la germanligvaj regionoj, Leipzig.

La Tribune Espérantiste, organe de propagande des espérantistes français, — kvaronjara. Redakcio: Alb. Lienhardt, Haguenau-Gare (Bas-Rh).

Informoj de Esperanto Asocio de Estonio, Tallinn.

La Unuigita Tutthomaro, Hamburg-Blankenese, Weddigenstrasse 1.

Tutmonda Intersteno — internacionalstenografio. Monata gazeto kaj ofic. organo de la Tutmonda Intersteno-Asocio. Redaktoro: Fr. Graser, Enkheim bei Frankfurt a. M.

Vegetarano — ofic. org. de la internacia Vegetarana Ligo Esperantista. Adreso: Oscar Bünemann, Hamburg 24, Papenhundestr. 32, II. Germ.

The British Esperantist — ofic. org. de Brita Esp. Asocio, London.

La Etulo — monata gazeto ilustrita por geknaboj. Jare: 10 fr. fk. Adm.: s-o Georges Othon, 6 Rue de la Smala, Paris — XV.

Bulteno de Internacia Transportlaborista Federacio, Amsterdam, Vondelstraat 61.

DE LA REDAKCIO.

Al ĉiuj siaj abonantoj, legantoj kaj amikoj Redakcio kaj Administracio de P. E. sendas **korajn dezirojn** de ĝoja pasigo de l' Paskaj festotaĝoj.

La nunmonata numero aperas en **pligrandigita amplekso** pro abundeco de urĝa materialo.

De nia estimata samideano, s-o **Aleksy Leszek Lasiński en Kalisz** ni ricevis leteron kun propono, kiu meritas la plej varman subtenon kaj apogon de ĉiuj niaj samideanoj en Polujo. Jen mallonge la propono: Espereble al ĉiuj pollingvanoj estas bone konata la eminenta propaganda verko de dro Czubryński, la verko celanta popularigi kaj diskonigi nian ideon en vastaj rondoĵoj de nia socio. Eldoninto de la verko konsentis vendi tutan restintan kvanton de la verko t. e. 2.500 ekzemplerojn nur po unu zł, kvankam la libreja prezo estas 3 zł. Do, se troviĝus inter ni 50 samideanoj aŭ societoj, kiuj povus elspezi po 50 zł, la afero estus plene solvebla. La libron pro ĝia malkareco oni povus poste facile disvendi inter la konatoj, kaj ĉiu el la aĉetintoj ricevus sian monon.

Do Samideanoj! Por la bono de nia kara ideo ni alvokas kaj instigas ĉiujn, ke vi ne hezitu elspezi por la akiro de la verko kelkan monon. Pripensu ke la disvendo de tiu libro preskaŭ garantias al ni almenaŭ 2.500 novajn samideanojn. Por plifaciligi la aferon turnu Vin al la proponinto **grandare** (ne unuope), ligante grupojn, kiuj estus pretaj aĉeti po kelkdek libroj. Monon ankoraŭ ne alsendu, ĉar oni devas fari antaŭe prikalkulon ĉu ĉiuj ekzempleroj disvendiĝos.

Neniu sin detenu!

Danko. Al la Berlina Grupo: S-roj Glück, Wilke, Spitta, Wichert, Münz, Brauser, S-ino Rosa Solländer, Vöcker, Rissman, Ellerbeck, Molle, Conrad kaj aliaj, kies nomoj bedaŭrinde ne estas sufiĉe legeblaj — koran dankon por la karto kun salutoj.
O. Bujwid.

Urbo Stockholm eldonis tre belajn afiŝojn okaze de okazonta tie eskpozicio (majo ĝis septembro 1930) kun esperanto-surskribo. La alsenditaj afiŝoj estas elpenditaj en multe frekventataj publikaj institucioj en Kraków.

P E T O.

Bulgara Esperantista Asocio starigas esperantan ekspozicion por la tuta lando. Por efektiviĝi ĉi gravan taskon, celante la popularigon de esperanto en ĝia plej ampleksa tavolo, ni petegas la landajn asociojn, societojn kaj tutmondan esperantistaron, sendi al ni esperantaĵojn, librojn, gazetojn, fotojn de eminentuloj-esperantistoj, gvidlibrojn, prospektojn, afiŝojn en kaj pri esperanto, interesindaĵojn k. t. p. per kio oni abundigos nian ekspozicion.

Sendube ni esperas viajn sendaĵojn.

Vi multe kaj efike utilos al nia iniciato por antaŭenigi pli la intereson de la publiko ĉe ni al nia movado.

Bonvolu sendi ekspoziciaĵojn al jena adreso:

Bulgara Esperantista Asocio, Ruse, str. „Bojanci“ 5 Bulgarujo.

Antaŭdankante al vi, ni salutas vin estimplene **B. E. A.**

Se Vi volas ekkoni la animon de hungara popolo, aĉetu tre interesan libron

„Poemaro el Hungarlando“

(Hungaraj poetoj de la XVI-a jarcento ĝis niaj tagoj)
tradukita de Francisko Szilágyi.

Ricevebla ĉe Eldona Sekcio de Pola Studenta Esperantista
Societo — Warszawa, Leszno 99/5.

La prezo zł. 4.80 — kun aŭfranko zł. 5.30.

SKRIBU TUJ !

al la oficejo, por ke vi ricevu senpage kaj aŭfrankite la specimenojn
de la Esperanta Gazeto „Oomoto“
antaŭ ol vi ĝin abonos.

Oomoto Propaganda Oficejo, Kameoka, Kioto-fu. (Japanujo).

Libreja Fakoj de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS :

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Balucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bcnnsels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultuis — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Butler — Himnaro Esperanta	3.00
— Kantaro Esperanta	3.00
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.30
Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego	0.50
Czubryński — Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komedi. trad. Ant. Grabowski	1.60
Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krioj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75

Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hector Hodler — Lia vivo kaj lia verko	4.00
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30.	
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929	6.00
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karinthy — Norda vento; novelkolekto	1.30
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Poŝtkartoj (kun moto de Żeromski) 10 pecoj	0.50
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Slowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Ŝlosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp.	5.00
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	2.00
Wells — La dormanto vekigas	5.00
Wiesefeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp.-pol.)	4.00

La verkoj de Zamenhof:

Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taŭrido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baŝarafi. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.